**Esperantista poŝkalendaro 1949.** Eldono de Esperantista klubo en Hradec Králové sub aŭspicio de Esperanto-Asocio en CSR. 154 + 20 pĝ 10×14 cm. Prezo Kĉs 32.50 afr. ĉe nia librovendejo. — EK en Hradec Králové plenumis evidentan esperantistan bezonon, eldoninte pasintjare kalendaron en poŝformato. La kalendaro disiris tiam tre rapide inter la esperantistaro kaj tiu bona sperto instigis nian viglan grupon ripeti la eldonon nunjare. La kalendaro por 1949 estas pli ampleksa ol la unua kaj kelkrilate ankaŭ pli enhavoriĉa. Krom kalendara parto ĝi enhavas La Esperon kun notoj, Bulonjan Deklaracion, mallongan adresaron de entreprenoj korespondantaj en E, kaj kelkajn utilajn rubrikojn. Ĝi estas bele presita kaj fortike bindita. Ĝi certe trovos denovan plaĉon ĉe esperantistoj. (O. G.)

**Leteroj de L. L. Zamenhof.** La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezentado kaj komentario de prof. G. Waringhien. I. 1901-1906. Eldonis S. A. T., 67, Avenue Gambetta, Paris-20. 1948. 370 paĝoj, 14×18 cm. Prezo bind. 3 dolaroj. — (Ĝi estas unu el la plej gravaj dokumentoj por historio de esperantismo. Zamenhof multe korespondis. Liaj leteroj estas modelo de klareco kaj simpleco. Li fidis firme sian aferon. Eble tial estis lia stilo tiom klara. Nun aperas liaj leteroj al tiamaj francaj eminentuloj kun komentoj de Waringhien, kiuj priskribas la tiamajn situaciojn. La legado estas streĉa. Estas efektiva dramo. La eldoninto kunmetis leterojn kronologie sed enmetis inter ilin priskribojn de situacioj kaj kun maloftaj saĝo, sagaco, sprito kaj amo li pentris karakterojn de la rolantaj personoj. Beaufront, Bourlet, Cart, Michaux, Sebert, Javal, Fruictier kaj aliaj marŝas antaŭ la leganto. Ne mankas kritiko: Ekz. Fruictier malutilis al E. per fondo de la Presa Societo. Kontraktoj pri Kolekto Aprobata de Hachette. Leteroj kaj agadoj pri reformoj. Pri unua tabelo de neologismoj. Estiĝo de Lingva Komitato kaj de la deklario pri Esperantismo kaj pri Neŭtraleco. La eldonanto daŭre komentas el sia ampleksa kaj funda scio. Lia „prologo“ estas laŭ mia opinio majstroverketo. — Kompletigo estu tamen permesita pri unu detalo: Revuon Internacian ne fondis Seleznjov sed Teodor Ĉejka, kiu ĝin redaktis kaj eldonadis, Seleznjov estis kunlaboranto kaj unu el la instigintoj.

**La ĝajaj edzinoj de Windsor.** Komedio en Kvin Aktoj de William Shakespeare. El la angla originalo tradukita de Stephen A. Andrew. 1948. The Esperanto Publishing Co Ltd, Rickmansworth, Herts., Anglujo. 92 paĝoj 13×18 cm. Prezo 3 ŝil. 6 p. — Tiu ĉi traduko de la fama komedio estas jam la dek-unua dramo tradukita el verkaro de la glora dramverkisto, kiel nin informas tre bona antaŭparolo de la tradukinto. La ĉefa principo, kiu gvidis la tradukinton, estas redoni la tekston plej fidele, adekvate kaj samtempe kompreneble. Tio ne estas tasko facila, ĉar kelkaj personoj parolas en lingvo fuŝa por substreki komikecan karakteron de kelkaj scenoj. Ankaŭ vortludoj aŭ komikaj parolturnoj estas oftaj. Iam komencas la rolantoj paroli en versoj. La tradukanto sukcesis venki la malfacilaĵojn en kelkaj lokoj brile. Ekz. babilado de Quickly kun Falstaff sur paĝo 35. Li uzas iam taŭge kunmetitajn vortojn, por redoni la originalan nuancon. Ekz. deklamaĉema, kapaĉo, ĉekalkane, kolektu ĉiujn viajn intelektojn (la pluralo ŝajnas al mi tie ĉi tre taŭga), enfone, devigu ilin fortroti, k. t. p.

Legado de la komedio estas ĝuo, oni rememoras impresojn antaŭ multaj jaroj, kiam legis junulo. Sed ankaŭ homo maljuna estas tuŝata per genieco, kiu plektas el najvaj faktoj komedion edifantan por konvinko, ke ĝajeco kaj ĉasteco estas rezultoj de la sama spirito klera kaj kuraĝa. La tradukinto akceptu dankon, ke li tion ebligas per sia fidela redono de la teksto. Ĝi estas tria Shakespeare-traduko de li. — La tipografia aranĝo de la libro estas tre plaĉa.

**Sándor Petöfi: Johano la brava.** El la hungara tradukis K. Kalocsay. Dua eldono 1948. Literatura Mondo, Budapest 1948. — En la jaro 1923 tradukis K. Kalocsay versitan fabelon de Aleksandro Petöfi pri Johano la brava en Esperanton. Estis lia unua iom granda poezia verko. Hodiaŭ, post 25 jaroj, la Literatura Mondo aperigis la duan eldo-

non de la sama verko, kiun tamen la tradukinto konsiderinde alilaboris. Estas tre instrue kaj interese legi kaj kompari ambaŭ tekstojn, inter kiuj kuŝas tempa distanco de unu kvarono de jarcento. Ni povas tiamaniere mezuri ne nur la progresojn de K. Kalocsay, kiu dume fariĝis plej elstara majstro de la vorto kaj verso en Esperanto, sed ankaŭ la progresojn de nia lingvo mem. — Ni povas nur varme rekomendi ĉi tiun legaĵon al niaj versamaj kaj versemaj samideanoj. Se iuj ektimis antaŭ aliaj verkoj de Kalocsay, ekzemple antaŭ lia Infero de Dante, sur kies enhavaj kaj lingvaj krutaĵoj oni povas eksenti kapturigojn, ĉi foje estus tiaj timoj senbazaj. La fabelo, tiom simila al niaj popolaj fabeloj, rakontas pri paŝtista knabo, trovita infano, kiu devis foriri el la hejmo, forlasante tie sian amatinon Iljonon, suferigatan de malbona duonpatrino. En la mondo li travivas grandajn aventurojn, batalas kontraŭ malbono inter homoj kaj inter supernaturaj estaĵoj kaj fine konkeras ankaŭ la Felandon. Tie li renkontiĝas kun sia amatino, kiun li revokis el la mortdormo, kaj ili ambaŭ fariĝas gerecoj en ĉi tiu fabela regno. — Krom simpla enhavo distingiĝas la verko ankaŭ per simpla formo: Stro-

foj po kvar verslinioj, ĉiu verso el ses trokeoj. Sed kiel pure ili estas ellaboritaj! Kiel fajreras la riĉaj rimoj kaj spritaj vortturnoj. — Sed por doni impreson pri la stilo kaj enhavo de la verko, ni recitu kelkajn versojn pri la disiĝo de Johano (Janĉi) kaj Ilno:

„Laste mi vin vidas, ho printemp' de l'koro,  
laste al vi plendis mia ŝalm-sonoro,  
laste mi vin kisas, ĉirkaŭprenas ame.  
Ve, mi vin forlasas, iras por-ĉiame.”

Kaj disiĝis ili: branĉo kaj folio;  
ambaŭ korojn kovris vintro per glacio.  
Al ŝi densaj larmoj sur la vang' ruliĝis,  
per maniko vasta Janĉi ilin viŝis.

Lj ekiris, iris nur sen voj-elekto,  
estis ja egale, kien la direkto...  
Lin paŝtistaj buboj fajfe preterflankis,  
la bovaro tintis — li eĉ ne rimarkis.

Pumpr.

## LOKAJ INFORMOJ

**Bratislava.** — Slovaka Esperanto-Societo renoviĝis post la somera paŭzo regulajn kunvenojn de esperantistoj en la ĉefurbo ĉiun merkredon en blua salono de YMCA, kie ili okazas dum du jardekoj. La 10. XI. 1948 okazis tie vespero kun longa amuza programo. La kvara programero estis „Rememor je malnova pioniro Dr Stan. Kamarýt”. La amikoj el Bratislava akceptu modestan dankon de la raportanto.

**Brno.** — E. K. aperigis belan gratul-karton por Kristnaska festo. — Programo de la kunvenoj: 11. I. Dramo de antikva tempo ĝis nun (J. Vondroušek). 18. I. Vizago de terglobo; filmstrio kun prelego (J. Kořínek). 25. I. Ni ekzercas kantojn (sub gvido de s-ino Věra Borská). 1. II. Hungara vespero (J. Friedrich). 8. II. Generala kunveno de la klubo. 22. II. Literatura vespero (J. Hoffner). 1. III. Adiaŭ la karnavalo. 8. III. Debatvespero. 15. III. Vespero de kantoj kaj arioj (kantas Věra Borská, operkantistino, violonas Libor Hlaváček, koncertmajstro de Janáček-ope-rejo, ĉe piano Vilibald Scheiber, komponisto kaj profesoro de konservatorio). 22. III. Luzacio, historio, lando, popolo (T. Borkovec). 29. III. Scienco kaj miraklo (V. Duroň). 5. IV. Ĉu vi kredas magion? (L. Rýznar). 12. IV. Malĝojaj sortoj de komponistoj (V. Scheiber). 19. IV. Vojaĝoj de Richard Hulliburton (M. Vondroušková). 26. IV. La rido sanigas (R. Nečas). — Progresintan kurson gvidas nun nur J. Friedrich.

**Brno-Židenice.** — La ekspozicion, kiun aranĝis nia Loka grupo kaj en kies aranĝo speciale helpis geedzoj Jakubec kaj V. Falta, vizitis preskaŭ 1500 p., inter ili lernantoj de du lernejoj, akompanataj de siaj instruistoj. Rezulto: Du kursoj por komencantoj.

**Bytča.** — Depost la 18-a de Okt. kurso en loka grupo de skoltoj por 24 p., gvidas fratulo Chůtka el Pov. Bystrica.

**Doksy.** — La Klubo aperigis la 31-an de Dec. la 4-an folion de sia ĉeflingva Informa Servo. Por monatoj Januaro—Marto estis lotume fiksita sekvo de temoj por ĉiusemajnaj dekmintaj raportoj.

**Hradec Králové.** — Ĉe la klasika gimnazio oficiale establiĝis rondeto de Esperanto-adeptoj (zájmový kroužek esperantský), en kiu partoprenas 17 knaboj. Ankaŭ ĉe la knabina gimnazio estas fondita samspeca rondeto, al kiu aliĝis 30 lernantinoj. Ambaŭ rondetojn — favoratajn de la estraro — gvidas prof. Miloš Lukáš.

**Cheb.** — Du kursoj de nia Loka Grupo dum Oktobro—Decembro en la propra klubejo. En la unua instruas s-o Roman Bystřický 16 p., laŭ lernolibro de Šupichová, en la dua s-o V. Dvořák 9 p. laŭ Kilian. Kiel inspektoro de ambaŭ kursoj funkcias J. Patera, kiu krome gvidas konservacion en ambaŭ kursoj.

**Chomutov.** — Depost Oktobro daŭras du kursoj: por komencantoj kun 25 p., por progresintoj kun 10 p. En ambaŭ instruas Karel Mucha laŭ lernol. Kilian, kombinita kun Cseh-metodo.

**Chotějovice, p. Světec u Bíl.** — Kurso por ministoj en la karbominejo Patria I-III komenciĝis la 22-an de Dec. por 15 ministoj, gvidata de s-o Simon Tíbor.

**Chrastava.** — Oni klopodas reaktivigi la tiean klubon post foriro de la prez. Jarosl. Húda. Provizora prez. Lad. Mlejnek, Nova adreso: Esperantista klubo, sekret. Václav Levora, Andělohorská 9/56, Chrastava. E-kurso-komenciĝis en finaj tagoj de Oktobro, ing. Fanta de EK Liberec instruas tie 24 p., krom 10 estas ĉiuj mezlernejaj lernantoj.

**Jihlava.** — Regiona redakcio de Práce sisteme propagandas E-on en sia montra fenestro en strato Dr E. Beneše 28. Estas tie ekspoziciataj ĉiu nova numero de nia gazeto, eksterlandaj gazetoj esperantaj, esp. traduko de nia Konstitucio, esp. leteroj el eksterlando k. a. (Jen ekzemplo por lokaj laborantoj, serĉantaj varban materialon por simila celo!) La 1-an de Februaro komenciĝis nova kurso en la sindikata Instituto de modernaj lingvoj. Instruas denove redaktoro J. Zeman.

**Karlovy Vary.** — Generalan kunvenon la 20-an de Januaro gvidis, anstataŭante la malsanan klubestron, vicprezidanto František Mílek. — La nova, ĉiesvoĉe elektita komitato: MUDr František Vaněk, prezidanto; František Mílek, vicprezidanto; František Mašek (K. Vary, třída pres. Klem. Gottwalda 17), I. sekretario kaj bibliotekisto; Marie Žahourová, II. sekretar.; Petr Tichota, kasisto; Antonie Sahánková kaj Rudolf Emmer, revizoroj; Bedřich Pačák, klubejmastro; Marie Kempfová kaj Ant. Reček, komitatanoj. — Al eksprezidanto s-ano Rudolf Emmer ni esprimas koregan dankon kaj ni sincere deziras al li baldaŭan resaniĝon. — La regulaj klubaj kunvenoj ĉiun lundon, junularo ĉiun jaŭdon (19—21 horo) en la propra klubejo en Bělehradská strato 3 (proksime de la juĝejo).

**Kladno.** — La 5-an de Oktobro komenciĝis en meza lernejo E-kurso kun 12 lernantoj. Instruas F. Ochočný kaj B. Vlčková laŭ Kilian-lernolibro.

**Lanškroun.** — La 22-an de Decembro estis elektita komitato de nia Loka Grupo: Prezidanto Fr. Mlýnař, instruisto, Kralická 689; vicprez. Ad. Slezák, Tylova 263; sekret. Jos. Ryšavý, asekur-oficisto, Kollárova 449; kasisto Josef Břiza, drogist, nám. Dr Ed. Beneše 45; ceteraj komitatanoj: Milena Kopecká, instruistino, Vrchlického 415, Hermína Thunová, ofic. de Loka Nacia Komitato, Rybníční 378, Karel Bednář, stud., Palackého 341 (por junularo), Jar. Dittrich, Sázava 66.

**Litoměřice.** — Per urba disaŭdigo estis alvokitaj interesuloj pri E. al kunveno, kiun partoprenis ankaŭ 16 membroj de Loka Grupo. Estis starigitaj du kursoj: por progresantoj kun 6 p., por komencantoj kun 15 p., postaj aliĝoj pliiĝis la nombro. En ambaŭ kursoj instruas Dr J. Černý.

**Olomouc.** — Esperantista Societo en O. daŭre kreskas. En fino de 1946 ĝi havis 53 membrojn, en 1947 jam 130, tiun ĉi jaron ĝi atingis 186 anojn; tiel ĝi fariĝas unu el la plej grandaj lokaj grupoj. (Informilo Haná Jeseniky, Dec.) — Junularo kunvenas nun ankaŭ en la klubejo ĉiun merkredon je la 18,15 horo.

**Opava.** — Tria aŭtuna kurso 20-leciona komenciĝis 9-an de Novembro kun 30 p., kiujn varbis inter la lernantoj de la Baza Faka Lernejo la sekret. de Loka Grupo ŝkpt. Ota Erben. Instruas Slaný ĉiun mardon. La financan flankon de la kurso prizorgas la Supera Kleriga Bezruč-Lernejo kaj la Kleriga Konsilantaro (insp. J. Pišala, instr. Kudela, instr. Sysel). La enkondukan lecionon partoprenis krom la supre nomitaj tri sinjoroj ankaŭ prof. Tichý de la Faka lernejo, kiu havas ankaŭ multan meriton pri la sukceso. La 19-an de Novembro parolis Erben al 25 skoltaj gvidantoj kaj al 20 membrinoj de YWCA pri E. en la YWCA-kunveno. Kun helpo de Kuzník, Závodný kaj Koptík li prezentis provan konversacion, kiu vekis sinceran intereson por anoncita nova kurso.

**Ostrava.** — S-o Karel Škrobák, fervojisto, sukcesis post kurso (13. X.—21. XII.) fondi Fervojistan Esperantan Rondeton kun 22 membroj-fervojistoj; kunvenoj jaŭdojn je la 19-a horo en la leĝejo de ČSD. Dum fonda kunveno la 9-an de Decembro estis decidite aliĝi korporacie al nia Asocio. Adreso: Ostrava, hlavní nádraží, čítárna ČSD.

**Pardubice.** — Depost 12-a de Novembro daŭras kurso por komencantoj kun 11 p., instruas Fr. Nálevka. En kurso por progresintoj depost 19-a de Novembro instruas 8 p. Ant. Jandík. La 3-an de Decembro prezentis la EK „Dro Schulhof“ per komunaj klopodoj de Josef Štechr kaj Ant. Jandík filmon pri Palestino. Danke al subteno de loka gazetaro la intereso por nia afero en Pardubice kreskas.

**Plzeň.** — Laborista Societo „Kulturo“ aranĝas elementan kurson por 16 partopr. kaj duagradan kurson por 20 partopr. Instruas Frant. Kalný en la unua, en la dua Rudolf Burda. — La klubo O. B. E. aranĝas en kunlaboro kun LUH elementan kurson por 31 part. (instruas Svoboda laŭ la Cseh-metodo), kaj duagradan kurson por 11 part. (Pelcman, Büchl-gramatiko kaj 1/2 Fundamento.) — Junularo de O. B. E. okazigis dum la jaro 1948 kurson per progresintoj ĉiujn mardojn, instruadis s-o Láda Proskovec. — La 20. XI. okazis vespero por adiaŭi rekrutojn, 6. X. Santreuil-koncerto tre sukcesinta, 19. X. prelego de J. Vitek pri Svedlando. La 4. XII. Nikolao-vespero. Ĉiuj-ĉi entreprenoj en amika kunlaboro de OBE kaj Kulturo. — Laborista Asocio Esperantista disiĝis, ĉar ĝi volas ankaŭ tiamaniere helpi al plifortigo de nuna unueca organizo esperantista. Ĝia sciigo pri disiĝo estis konfirmita de la ZNV en Praha per dekreto n-ro I-6-5508/9-1947 el 7. VIII. 1948. Samideano Josef Pech estu salutita pro tiu ĉi saĝa decido. — Orient-Bohemiaj Esperantistoj kaj Kulturo kunfandiĝis en kunveno la 27-an de Jan. Per tio venis en nian okcidentan metropolon la dezirata ordo organiza. Samideanoj en Plzeň estu salutitaj kun danko.

**Podmokly.** — La 26-an de Novembro aranĝis en halo de urba biblioteko la Loka grupo paroladon de Jos. Vitek „Svedujo, mia dua patrujo, kaj Laponlando“ por multaj atentaj aŭskultantoj, ĉefe junuloj. Ĉiuj ricevis ĉe la enirejo la varbilon Pojtko. Vitek sin montris lerta kaj alloga parolanto, la aŭskultintoj kaj la aranĝintoj estis tre kontentaj.

**Roudnice.** — La 20-an de Novembro malfermita kurso kun 15 p. por fervojistoj kaj nerfervojaj interesuloj. Instruas MUDr Jos. Černý. Helpis varbi por la kurso laŭ ekzemplo de Litoměřice la urba disaŭdigo.

**Slezská Ostrava.** — La 16-an de Jan. kunvenis Na Kamenici 36 membroj de kelkaj kluboj el Ostrava-regiono sub prezido de s-o Ant. Šrámek. Ili prezentis raportojn

pri sia agado, kaj traktis pri starigo de Somera Esperanto-Lernejo en Beskydy. Estis komisiita Vlad. Slanýna esplori la aferon kaj efektiviĝi ĝin. Estis elektita regiona komitato: Prez. Vlad. Slaný (Kutuzovova 29, Vítkovice), vicprez. Skařupová, sekretario Ant. Šrámek (I. Karolinská 5), idea ref. Fr. Lička, kas. P. Bubík, reviz. Kubala, prof. Sl. Klegová, presoref. Jan Pavlas.

**Svit.** — Kurso por komencantoj kun 20 p., por progresintoj kun 10 p., ambaŭ gvidataj de Dr-o E. Sahliger. (E. S.) Postkongreson la 24-an de Aŭgusto partoprenis 50 p.

**Šluknov.** — En la teks-entrepreno Bavlňánské závody estis starigita rondeto de E-komencantoj, 20 knaboj proks. 18-jaraj.

**Tanvald.** — Statuto de nia Loka Grupo estis aprobita de ZNV en Praha per dekreto el 6. XI. 1948 n-ro I-6-2257/2-48. — En la jara kunveno la 12-an de Jan. estis elektitaj prez. Evžen Belda, seruristo, Šumberk 461, vicprez. Lud. Jakoubě, instruisto, Velké Hamry, sekretario Zdeněk Rezáč, oficisto, Svárov 410, p. Velké Hamry.

**Teplice.** — E. K. aperigis tre belan duoblan karton por novjara saluto kun gravuraĵo de Studnička „Kastelaj turoj de Teplice“. — Nova adreso: Esperantista klubo, Teplice I. Kunvenoj ĉiumarde je 19.30 h. en urba biblioteko.

**Trutnov.** — Nova adreso de EK: Frant. Toman, faka instruisto, Havličkova 21. Kunvenoj ĉiun unuan kaj trian mardon en monato je la 20-a horo en Národní dům.

**Třebíč.** — La Loka Grupo aranĝis kun la Supera Žerotin-lernejo popola kurson, kiun gvidas s-ano Th. Kilian. La kurson, kiu komenciĝis la 6-an de Oktobro 1948, partoprenas 42 lernantoj, el kiuj 14 jam aliĝis al la Loka Grupo. Oni instruas en la komerca supera lernejo unu fojon semajne po 90 minutoj. Sur la afiŝo ni anoncis sesmonatan kurson, sed fakte ĝi daŭros ĝis la fino de Junio. Ni esperas, ke ĝis tiam ankaŭ la ceteraj kursanoj iĝos anoj de nia Loka Grupo. La kursanaro konsistas precipe el laboristoj, instruistoj, studentoj kaj ĵurnalistoj. (tk)

**Turčianske Teplice.** — Kurson por 40 studentoj de la Instruista Akademio gvidas MUDr L. Izák. (E. S.)

**Turč. Sv. Martin.** — Kurson por 30 gimnazianoj gvidas MUDr L. Izák; por lernantinoj de knabina mezlernejo Olga Rumannová. (E. S.)

**Ústí nad Labem.** — E-kurso de la Loka Klubo komenciĝis la 15-an de Septembro kaj finiĝis la 22-an de Decembro. Anoncis sin 30, la kurson finis 15 p. Miloš Hlaváček instruis laŭ lernol. Kilian.

**Vitkov apud Opava.** — Laŭ iniciato de Adolf Witoszek el Opava komenciĝis la 24-an de Novembro E-kurso en meza lernejo kun 25 p., Slaný el Ostrava instruas tie dum 2 horoj unu- aŭ dufoje semajne. Helpas lin Cestmír Závodný el Opava. Ĉiujn kostojn pagas la Kleriga Konsilantaro en Vitkov kaj Kleriga Lernejo en Vitkov, en kies nomo Bohumil Bilek, direktoro de loka meza lernejo, la kurson malfermis per simpatia parolado.

**Vsetín.** — Du kursoj, aranĝitaj de la E-sekcio de „Klubo Z“ en la loka fabriko Zbrojovka. La unua komenciĝis la 13-an de Oktobro en Teatro Z kun 18 p., la dua estas en la najbara Jasenice por 30 metilernantoj de tiu entrepreno. Oni lernas dufoje semajne. En ambaŭ instruas Aleš Berka laŭ propra lernolibro, kiun eldonis proprakoste la supre nomita E-sekcio.

Adolf Malík:

*Rememoro je mia mortinta edzino Agneso*

<i>Forvagiĝis miaj pensoj</i>	<i>Nun mutas violono —</i>
<i>serĉante la edzinon.</i>	<i>sed vokas rememoron.</i>
<i>En miaj okul-tensoj</i>	<i>En anĝel-regiono</i>
<i>mi vidis ŝian finon.</i>	<i>mi trovas ŝian koron.</i>

*Fidela amo ŝiu,  
ho estu propetanto,  
dum lasta minut' mia,  
dum lasta mia kanto!*

**TIUJARA KONGRESO estos pli solena**

**ol kutime kaj okazos en LIBEREC la 4—6-an de Junio. Zorgu, ke vi estu dum pentekosto libera por povi veni! Estas invitataj ĉiuj esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, ankaŭ tiuj, kiuj ne estas niaj membroj.**

**S-ro ministro V. Kopecký akceptis honoran patronecon de la kongreso.**

## ČESKÉ LISTY O ESPERANTU

Universitní profesor doktor Václav Tille řekl před pětadvaceti lety: „Pokud jde o sblíživací snahy mezi národy, mnoho si slibují od hnutí esperantského. Jeho členové jsou, jak jsem sám seznal, navzájem spjatí jakýmsi duchovním svazkem, jak tomu bývá u přívrženců toho neb onoho náboženství. Můžete se naučit franštině nebo angličtině a potom si zajet na příklad do Egypta; dobrá, dorozumíte se sice s mnoha tamějšími lidmi, ale nedosáhnete nic víc, nežli že se s nimi právě dorozumíte. Vyjedte si však do světa se znalostí esperanta. Lidí, s kterými se smluvíte, najdete prozatím méně, leč užasnete, až vás uvítají jako vlastního bratra a prokáží vám nejednu cennou úsluhu.“ (Lidová obroda, Brno, 31. X. 1948.)

Ve sbírce KDO JE vydala naše pilná spolupracovnice J. Š. pěkný životopis vynálezce esperanta a zakladatele esperantského hnutí. Loni bylo tomu 30 let, co Zamenhof ve Varšavě zemřel, a napřesrok bude svět vzpomínat, že již uplynulo 110 let od jeho narození. V tomto životopise se autorce podařilo vylíčit, jak vzkřičily pohutky a rostly první pokusy o nový mezinárodní jazyk, o jakém snil již i náš Komenský. Zamenhof jako oktáván utvořil první pokus o mezinárodní jazyk, ale teprve po 9 letech vydal — již jako lékař — učebnici esperanta pro Rusy. A po 18 letech uvítalo jej na I. mezinárodním sjezdu esperantistů v Boulogne sur Mer 700 esperantistů z 20 zemí. Tvůrce esperanta, tehdy 46letý chudý lékař, který obětoval své myšlenky všem, zahájil svou řeč slovy: „Svatý je pro nás dnešní den... Po prvé se začíná uskutečňovat sen tisíciletí...“ — Dnes již zaznívá esperanto denně i v rozhlase i na všech velikých nádražích. Mezinárodní jazyk si dožil uznání a slouží dobře nejnepřehlednějšímu ideálu dorozumívání mezi národy. Knížka J. Š. je dobrým úvodem do otázky mezinárodního jazyka a pěkným vzorem, jak psát životopis zasloužilého člověka. H. (Zdravý lid, IX/X 1948.)

Esperanto v japonském rozhlase. Tak jako v mnoha evropských a amerických zemích, osvědčuje se esperanto také v rozhlase japonském. Jak oznamuje dopis, podepsaný kruhem spolupracovníků, utvořil se v druhém největším městě Osace pod vedením T. Kurisu esperantský odbor při Japonské rozhlasové společnosti. Esperantu se učí ve zmíněné vysílací stanici řada herců, režisérů, zpěváků a úředníků. V dopise jsou dále líčeny poměry v japonském rozhlase a v závěru je projevováno přání navázat styk s rozhlasovými pracovníky esperantisty v různých zemích. Zájemci z řad odborníků v esperantském vysílání pište na T. Kurisu, Hannan-aho, Neka 5-23 N, Abene-ko, Osaka, Japanio. (Lidová obrana, Brno, 7. XI. 1948.)

Esperantisté pomáhají zachraňovat zdraví. V Koprivnici je čilá skupina esperantistů, kteří pěstují styky s cizinou. Je to věc prospěšná a záslužná. Společná idea mezinárodního jazyka umožňuje nejen seznámení a sdělování poznatků, nýbrž i konání lidských skutků milosrdenství. O tom svědčí případ z poslední doby. Jednomu Koprivničanovi hrozila ztráta okončetiny. Zlepšení mu mohly přinést jen injekce, které u nás nejsou k dostání. Když různé zákroky selhaly, obrátil se o pomoc k esperantistům. V několika dnech ampulky se zachraňujícím lékem skutečně došly. Dárci jsou tři lékaři (Brusel, Londýn, Švýcarsko), 1 norský lékárník a 1 holandský katolický duchovní. Z toho vidíte, že učít se esperantu se vyplácí. (Lidová demokracie, Praha 27. X. 1948.)

Čapkovy Obrázky z Holandska v esperantu. Holandské esperantské nakladatelství vydalo nedávno esperantský překlad Obrázků z Holandska v dokonalém převodu, velmi pěkné úpravě, s typickými kresbami autorovými. Velmi pochvalná je kritika v různých esperantských časopisech, která konstatuje, že jen zřídka kdy se podaří cizinci za poměrně krátkou dobu pobytu tak dokonale vystihnout duši národa a proniknout do cizího prostředí s takovou dávkou vtipného postřehu, jako se to podařilo Karlu Čapkoví. (Lidová obroda, Brno 27. XI. 1948.)

## KORESPONDI DEZIRAS

Korekto: 32-jara profesoro dez. koresp. tutmonde per il. k. aŭ letere pri div. temoj. Karel Pakosta, Alšova 24, Litoměřice. (En pasinta numero ni donis erare la nomon Patočka. Bonvolu korekti!)

Kun gesperantistoj el ĉiuj landoj dez. koresp. — Pk, Lč, L, F — Zdeněk Ritička, Letonice 141, p. Bučovice, Moravio, ĈSR.

Kun ĉeĥaj junuloj deziras korespondi:

14-jara Peter B. Stefanov, str. G. Dimitrov 50, Lom, Bulgario.

16-jara Veneta G. Panajotova, str. Sport 1, Brusarci, Lomsko, Bulgario.

18-jara Aleksí A. Dimitkov, str. G. Dimitrov 46, Lom, Bulgario.

17-jara Milka Koleva, str. Stara planina 17, Brusarci, Lomsko, Bulgario.

Kvardek gestudentoj 16—19-jaraj deziras koresp. kun junaj eksterlandanoj. Adreso: Vlastimil Nekuda, Ivančice, Ĉeĥoslovakio.

28-jara maŝina seruristo, memlernanto, komercanto, dez. koresp. kun ĉiulandaj samideanoj. Josef Novák, Jakartovico 41 u Opavy, ĈSR.

Korespondi kun gesamideanoj en ĈSR deziras Jan Křivák, Hluk 489, ĈSR.

S-ro Witold Wronski, 17-jara skolto, Radom, ul. Podwalna 20 m 6. Polujo, serĉas korespondadon pri filmoj, gazetoj, fotografado kaj interŝanĝas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

Kontraŭ unu internacia respondkup, ni sendas nian organon pri Budhismo. Societo por Orienta Kulturo, Venavägen 49, Oerebro, Svedlando.

## SDĚLENÍ

Znovu žádáme o sdělení, komu chybí některé stránky slovníčku. Jenom podle těchto sdělení budeme moci expeditovat.

Překlady textů 20. a 21. z čísla prvního možno zaslat ještě do 14 dnů po vyjítí tohoto čísla.

Slovníčku vyšly str. 89—104.

Ušnědnete nám práci: Obnovte svoje členství nyní nebo aspoň oznamte, kdy tak učiníte, abychom vám mohli rezervovat časopis.

Príspevkovou známku 1949 k nalepení do legitímace otiškneme až v příštím čísle. Pro krátkost doby mezi 1. a 2. číslem nebylo možno zpracovat platy denně hojně docházející. Toto číslo dostávají tedy všichni členové roku 1948.

Přes několikrát oznámení docházejí i platy pro UEA a Heroldo. Nemůžeme je převést a jsou plátcům u nás k dispozici.

## LITERATURA MONDO

La valora revuo, sen kiu ne povas esti serioza esperantisto. Inter la kunlaborantoj vi trovos ĉiujn nomojn famajn en Esperantujo. Abonon por 1949 Kĉs 150.— akceptas nia Librovendejo.

Paĝu tuj, se vi volas havi ĉiujn numerojn!

## Sveda Esperanto-Gazeto La Espero

trovis admirantojn tutmonde pro interesa enhavo, bela preso kaj regula apero. Se vi deziras aboni ĝin dum 1949, vi povas paĝi la abonkotizon Kĉs 85.— al nia Librovendejo kaj vi ricevos rekte el Svedujo ĉiumonate 8-, 12- aŭ 16-paĝan numeron ĉefe esperantlingvan.

Se vi deziras korespondadon kaj interŝanĝojn kun samideanoj de ĉiuj landoj, aliĝu ABC-Internacian korespondan kaj interŝanĝan klubon. Mendu propektojn ĉe prof. Petro Ževl, Kralovice u Plzně, Ĉeĥoslovakujo.